



# Eventoj

Redakcia adreso:  
Budapest, pk. 87.  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj telefakso:  
+36-1-2828885

Internacia sendependa gazeto pri la esperanto-movado

1 / decembro - '94

## AVERTO! ONI VOLAS TROMPI VIN!

Kio okazis jam dum jaroj al kompanioj kaj industrioj, nun evidente okazas al privataj: nigerianoj skribas leterojn al entreprenoj kaj nun do ankaŭ al individuoj, en kiuj ili faras tre allogan proponon: facilege vi riĉegiĝos sen ia ajn laboro! La ĉefa senco de ilia letero estas la jena:

Pro negocado pri kontrakto la nigeria ministerio aŭ alia instanco ricevis surpluson da mono (ĉiam centmiloj aŭ milionoj da dolaroj), kiun oni volas eksterlandenigi. Oni petas la kunlaboron de via bankkonto por parkumi tiun sumon dum certa tempo. Kiel rekompenco vi rajtas teni ekz. trionon de tiu monsumo. Vi nur sendu folion de via kompania aŭ persona leterpapiro, kaj tiun malplenan leterfolion vi nur surskribu. Vi ankaŭ menciui vian bankon kaj kontnumeron se ĝi ankoraŭ ne troviĝas sur la leterpapiro.

Poste povas okazi du aferoj:

- 1. Vi ricevas leteron, en kiu la nigeriano skribas, ke ĉio estas en ordo (la mono baldaŭ alvenos viakonton), sed vi bonvolu pruntpagi iom da mono por la bankelspezoj (plej ofte kelkmil-dolarojn, ja ĝi estas nur ereto de la gajnego tujvenonta). Se vi pagas, vi neniam plu aŭdos por ili.

- 2. Subite granda monsumo malaperas de via bankkonto. Je via protesto via banko montros pagordonon sur via leterpapiro, subskribita de vi mem!

Vi do neniam respondu tiajn leterojn!

Nun jam ankaŭ esperantistoj aliĝis al trompistoj! Mi ricevis nome tian leteron, kies enhavo estas tre konata al mi, ĉar en mia ĉiutaga laboro (Ĉambro de Komerco) entreprenoj ofte montras ilin al mi, deponante plendojn.

De kie mi scias, ke nigeriaj esperantistoj estas envolvitaj? Tre simple: en mia korespondado kun esperantistoj mi uzas karakterizon en mia adreso, kiun mi ne uzas en mia alia korespondado. Kaj tiu karakterizo troviĝis sur la al mi adresita koverto! Antaŭ ĉ. monato dum la Nederlanda Esperanto-Renkontiĝo, mi aĉetis kelkajn poŝkartojn kaj elektis adresojn en Afriko. La bonintenco de



tiu agado estis sendi kongressaluton al afrikaj esperantistoj. Nefidante nigerianojn, mi elektis adresojn en aliaj landoj. Tamen mi, korektante mian propran antaŭjuĝon, aldone prenis ankaŭ unu nigerian adreson. Monaton poste mi ricevis proponleteron en la angla lingvo. Ĉu hazarde? Eble. Tamen la rezulto restas sama: estas nigeriaj esperantistoj, kiuj misuzas, aŭ eble vendas adresojn de esperantistoj de la "unua mondo". Vi do estu singarda! Estas bedaŭrinde, ke bonuloj devos suferi pro la malbonuloj, sed ni ne permesu, ke fiuloj misuzu Afrikan Agadon por malpleniĝi vian bankkonton (kvankam kompreneble via stulteco plej respondecas, se vi respondis tian allogan leteron).

Sed nun vi estas avertita!

Inĝ. K. Ruig  
ĉefkonsultisto pri internacia komerco,  
Ĉambro de Komerco.  
Nederlando

Rim: Tamen, malgraŭ ĉio ni ne rajtas akuzi ĉiujn nigeriajn esperantistojn pro kulpo de unuopuloj. Se iu respondas al tia letero, meritas mem "ĝui" ankaŭ la sekvojn... La red.

## Karaj legantoj,

ni esperas, ke Vi estas kontenta pri la enhavo, stilo kaj aspekto de la gazeto. Se jes, ni petas Vin renovigi vian abonon por la sekva jaro.

La baza abonkotizo estas senŝanĝa, do 65 gld (kun aeroŝta sendo: 76 gld), kion vi povas pagi al nia UEA-kodo: ELLS-S aŭ la egalvaloron al iu landa kotizperanto. Pro la ŝanĝo de la poŝta tarifsistemo ni devas formi novajn prezojn por Polio, Ĉeĥio kaj Bulgario: 35 gld. La kotizo por Slovakio, Rumanio, Kroatio kaj Slovenio estas 29 gld, por Hungario: 1450 Ft.

Bedaŭrinde pro diversaj kialoj ne plu ni havas kotizperantojn en Ĉeĥio kaj Koreio. En Hispanio ekde nun ankaŭ HEF akceptas la abonojn! Esperantistoj el Latvio, Litovio kaj Estonio pri abondemandoj turnu sin al Litova E-Asocio, aliaj legantoj de eksa Sovetio kontaktu la eldonejon IMPETO en Moskvo aŭ REU.

La informo pri renovigo de via abono devas atingi nin plej laste antaŭ la 15-a de januaro (post tiam ni nuligos vian adreson ĉe la poŝto, kaj ili konsideros Vin kiel nova persono). Vi multe plifaciligos nian administran laboron, se ekz. per simpla poŝtkarto vi NUN informas ankaŭ nin pri la renovigo de via abono.

László Szilvási, red.

## PROTESTO AL LA TEJO-ESTRARO

En la pasintjara IJK la Komitato de TEJO akceptis decidon pri deviga, minimume 50 % rabato por t.n. B-landaj partoprenantoj. Tamen LKK de IJK-95 kun la aprobo de TEJO-estraro ignoras la Komitatan decidon.

4-a Mezeŭropa Junulara Konferenco  
Třebíč, Ĉeĥio

Al la Estraro de TEJO  
Rotterdam, Nederlando

Karaj,

ni memorigas, ke dum la 49-a IJK en Vraĉa la Komitato de TEJO (kiel la plej alta forumo) akceptis decidon pri la deviga, minimume 50 %-a rabato en IJK por t.n. B-landaj partoprenantoj.

Ricevinte la aliĝilon de la 51-a IJK, ni konstatis, ke la kotiztabelo neglektas tiun principon pri pli proporcia ŝarĝoportado, kio estas por ni plene neakceptebla, ja tio signifas ignoron de la komitata decido.

Ni, partoprenantoj de la 4-a Mez-Eŭropa

Junulara Konferenco postulas la nuligon kaj modifon de la aperigita kotiztabelo.

Krome, ni konstatis la nerealan nivelon de la partoprenkotizoj. Laŭ niaj scioj la preza nivelo en Rusio (eĉ sub la influo de "lavanga kapitalismo") ne postulas tiom altajn kotizojn.

Ni memoras pri la promeso de kondiĉoj, ebligantaj post longaj jaroj "amasan IJK-n". La nuna kotiztabelo tamen efikas male. Ni taksas nereala kaj neakceptebla la nunan strukturon kaj preznivelon de la kotiztabelo. (Ĉu vere oni devas pagi averaĝe 200 guldenojn nure por la programo - dormante surplanke en propra dormosako?)

Do, ni ripetas postulon pri nuligo kaj principa refaro de la kotiztabelo.

*[Signatures]*

12.11.1994, partoprenantoj de la 4-a MEJK

## Popolnombro en Esperantujo (6)

Sesa (kaj lasta) artikolo: Gvidlinioj por respondi la eternan demandon

### Esplorado de la kvalitoj de Esperanto kiel internacia vehikla lingvo


Supozu, ke en la ne tro fora estonteco iu ne-esperantista scienca institucio aŭ politika instanco, okupiĝanta pri problemoj, kaŭzataj de multlingveco en la mondo, decidus, ke la sola racia solvo estos adopto de neŭtrala internacia vehikla planlingvo. Ja estas certe, ke tiuj esplorantoj postulos solidajn faktojn pri la his-

direktoro de CED konstatis, ke tia grava enketo estas tro enorma tasko por limigitaj kapabloj de tia organizaĵo. Tamen, CED ne forlasis sian okupiĝon pri statistikado kaj diligente daŭrigis kolektadon de informoj pri "zeoj" - stratoj aŭ placoj je la nomoj de Zamenhof aŭ Esperanto, kiuj estis listigitaj laŭ landoj kun precizaj nomoj. Tiuj "zeoj" ja estis pli facile nombremblaj ol la kapoj kaj ĉapoj de esperantistoj!

Ĉu ekzistas alia organizaĵo en Esperantujo, havanta kompetenteco priskribi kaj statistike dokumenti aktualan uzon de Esperanto en la mondo? Ĉu UEA? Ĉu Akademio de Esperanto?

publikigis saĝajn konsilojn por respondi la eternan demandon pri la nombro de parolantoj de Esperanto, estas Stefan Maul, profesia ĵurnalisto. En sia *Manlibro pri Ĵurnalismo* (1982, pp.39-40) li donas la sekvajn gvidliniojn:

*Oni nepre rezistu al la tento diri iun ajn konkretan nombron de parolantoj de Esperanto. Klarigu kial neniu povas scii tion, ĉar, diference de statistikoj pri naciaj lingvoj, kiuj baziĝas sur adicio de la loĝantoj de la landoj, kie la koncernaj lingvoj estas ĉefe parolataj, en la kazo de esperantlingvanoj ne temas pri unu aŭ pluraj loĝantaroj de landoj. Plue, neniu povas*



torio de Esperanto dum ĝia pli ol centjara ekzisto. Inter iliaj demandoj povos esti la sekvaj:

1. Kiel estas eble demonstri objekte, ke Esperanto havas la kapablon forigi la malbenon de Babelo? 2. Ĉu la Esperanto-parolkomunumo kreskas, kaj se jes, kiom rapide kaj en kiuj mondpartoj? 3. La tro simpleca demando "kiom da esperantistoj aŭ parolantoj de Esperanto estas en la mondo nuntempe?" devos esti reformulita en la sekva maniero por prezenti pli precizajn donitaĵojn: "Sur kiuj niveloj de lingva kompetenteco scias kaj uzas Esperanton membroj de la Esperanta lingvokomunumo, kaj por kiuj celoj funkcias Esperanto en ĝia nuna stato de disvolviĝo?" La respondoj devos prezenti detalan priskribon de la socikultura kontinuaĵo de esperantlingvanoj: Ĉe unu poluso estas ordinaraj homoj, uzantaj Esperanton en praktika maniero por relative limigitaj personaj aferoj; ĉe la kontraŭa poluso troviĝas la esperantista elito, posedanta tre altan gradon de lingvokapablo kaj eventuale uzanta la lingvon por profesiaj kaj fakaj celoj. Estos necese akiri precizajn faktojn rilate ĉiujn nivelojn de lingvouza kompetenco laŭlonge de la kontinuaĵo, kaj tiuj donitaĵoj devos esti akiritaj per aplikado de objektivaj kriterioj de mezurado kaj taksado kaj per enket-metodoj multe pli rigoraj ol tiuj ĝis nun karakterizantaj la esplorojn de tro entuziasmaj movadanoj kaj propagandistoj. Tiala demando estas: kiun rolon havos diversaj institucioj en Esperantujo por plirigardi la bezonatan laboron?

### Fiasko de la enketo de CED

La unua klerula esperantista organizaĵo, kiu elpaŝis sur tiun terenon, estis Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvo-problemo (CED). En la Jarlibro de UEA por 1965 (p.98) aperis kiel ero n-ro 12 de la laborplano de CED por 1965/1966 la entrepreno en 1966 de enketo pri la nombro de personoj, kiuj parolas la Internacian Lingvon - "se la JIK (Jaro de Internacia Kunlaboro) donos la esperatajn rezultojn". En la Jarlibro por 1966 (p.62) la enketo pri la nombro de esperantistoj estis denove listigita en laborplano de CED por 1966/67 kun la klarigo, ke pro la longigo de JIK al 1966, la enketo estis prokrastita al 1967. En la sekvaj jaroj la ero titolita "Nombro de esperantistoj" ne plu aperis en la laborplano de CED. Estas evidente, ke d-ro Ivo Lapenna, la

Ĉu Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)? Ĉu Akademio Internacia de Sciencoj (AIS)? Ĉu Internacia Scienca Akademio Comenius? Tute ne! La aktuala stato kaj funkciado de tiuj organizaĵoj atestas, ke ili ne posedas fakscion kaj laborkapablon por plenumi la seriozan laboron de popolnombro en Esperantujo. Ankoraŭ unu grava objekto estas ilia statuso kiel esperantistaj organizaĵoj. Laŭ scienc-etika principo, ili ne rajtas mem fari la taksadon.

Sendube la plej bona solvo estas transdono de projekto al ne-esperantista organizaĵo, konsistanta el profesie kvalifikitaj lingvistoj, sociologoj kaj statistikistoj. Ĝis la tempo, kiam povos efektiviĝi tiu scienca objektiva esploro de la Esperanto-lingvokomunumo, ekzistas nur du elektoj por respondi la eternan demandon: 1. daŭrigo de la blufado kaj falsa statistikado de la pasinteco; 2. singarda esprimado kun pritrakto nur de rigore kontroleblaj donitaĵoj.

### Troigo de la grandeco de la movado

La argumentoj kaj atestaĵoj en la unuaj kvin artikoloj de tiu ĉi serio evidentigas, ke ĉiuspeca troigado estas kategorie rifuzenda. Oni devas unu fojon por ĉiam senigi informadon kaj propagandon je senrespondeca fanfaronado pri amasegoj da esperantistoj, kiuj ne estas facile identigeblaj, kaj kiuj estas nombremblaj per rondaj ciferoj, ĉerpitaj el la aero. Membroj de la Esperanto-komunumo devas alpreni severe honestan sintenon kaj devas rifuzi imiti la aŭdacan agadmanieron de ĉefpropagandisto Renato Corsetti, kiu, kiam li estis la komisiito de UEA pri regiona agado en Afriko, makiavelisme esprimis sin jene: "Mi petas vin ensalti en la vestojn de propagandisto. loma blufado aŭ minimuma silentado pri malpozitivaj aspektoj estas neevitebla".

### Singarda taktiko por kontentigi demandantojn

Oni tre singarde esprimu sin rilate la disvastigon de Esperanto kun emfaza mencio pri nur tiuj statistikaj donitaĵoj, kiuj estas objekte kontroleblaj. Se tiaj faktoj mankas, anstataŭ prisilenti la situacion kaj forpuŝi demandojn, oni honeste klarigu, kial ne eblas kompili fidindajn statistikojn pri homoj, kiuj lernas lingvojn.

Laŭ mia scio la sola esperantisto, kiu ĝis nun

starigi statistikon, ĉar ne estas registritaj ĉiuj homoj, kiuj lernis Esperanton. Membrenombroj de organizaĵoj ne helpas, ĉar nur minoritato de la lernintoj partoprenas en la organizita Esperanto-movado. Eble oni povas diri, ke UEA havas membrojn en pli ol 100 landoj, kaj se estas necese doni aliajn nombrojn, estas pli bone mencii tiujn de, ekzemple, UEA-delegitoj, librotitoloj kaj radiostacioj, kiuj elsendas programojn en Esperanto. Firme aserti ion alian pri nombroj estus mensogi.

Mi opinias, ke s-ro Maul eltrovis la plej sobran kaj praktikan manieron respondi demandojn, do liaj konsiloj estas akceptindaj.

Kelkaj movadaj funkcioj jam antaŭ longe adoptis la vidpunkton de s-ro Maul kaj en siaj publikaĵoj zorge evitis misinformadon per nombroj. Ekzemple, Stop-Bowitz kaj Isbrucker en sia *La Esperanto-movado: ĝia historio, organizo kaj nuna stato* (1948) pritrakis multajn lokojn en la mondo, kie troviĝas esperantistoj, sed ne indikis, kiom da ili estas en specifaj landoj kaj kontinentoj. Jen kelkaj tipaj frazeroj: "En Eŭropo Esperanto estas plej multe disvastigita", "Japanujo estas (en Azio) la lando kun la plej forta Esperanto-movado", "Afriko estas la nigra kontinento rilate al Esperanto", "...en Usono Esperanto estas relative bone disvastigita", "ekzistas kelkaj kluboj sur la Aŭstralia kontinento...", "En Nov-Zelando la movado estas relative bone organizita..."

Per lerta citado de faktoj pri ĉiuj pozitivaj aspektoj de la aktuala Esperanto-movado sen erariga indiko de nombroj de Esperanto-parolantoj, estas eble fari konvinkan prezentadon. Kontraŭe, kiam nombroj estas menciitaj, ili povas esti embarasaj demandojn. Ekzemple, en 1983 UEA publikigis anglalingvan informilon, titolitan *An update on Esperanto* (ĝisdatigo pri Esperanto). En la alineo "Uzantoj" estis dirite, ke "Kalkuloj ... indikas, ke la nombro de personoj kun iom da scio de la lingvo estas centoj da miloj kaj eble milionoj". Skeptikulo emas demandi: kiel oni povas demonstri, ke estas eĉ cent mil personoj kun iom da scio de Esperanto en la tuta mondo? Kie ili estas? Ĉu troviĝas dokumentebla pruvo? Mi estas tuteranta, ke neniu en UEA kapablos honeste respondi per faktoj, ĉar ili simple ne ekzistas. For la statistikajn blufojn!

Bernard Golden

## Esperanto aplikata

Maniero utiligi la IL-on

### Financ-policistoj: itale kaj?

La triesta filio de "Movado de demokrataj financ-policistoj" petis esperantigon de leter-teksto, adresita al la prezidanto de Eŭropa Parlamento.

La estroj de tiu movado opiniis agi tre korekte, skribante al internacia eŭropa instanco en la propra lingvo kaj en la internacia, tiel evitante uzadon de lingvo, apartenanta al alia popolo kaj kulturo.




Tion ni ŝuldas al la agado, farita okaze de la 6-a Alp-Adria E-Konferenco printempe fare de Triesta Esperanto-Asocio. Simpla renkontiĝo ĉe loka televida programo ebligis kontakton kun iu respondeculo kaj post ses monatojn jen propono: "Ni volas adresi peton al la prezidanto de Eŭropa Parlamento kaj sendi ĝin itale kaj esperante, ĉu vi povas traduki por ni la tekston?"

Jen la ĉefa enhavo de la letero:

### Lernolibro de fiziko?

Internacia grupo verkas lernolibron de fiziko en Esperanto. La verko estas celata unuavece por studentoj de la unuaj universitataj lernejoj, speciale al tiuj en la t.n. tria mondo. Tial ĝi estos malmultekosta kaj ne-luksa. Ĝi konsistos el apartaj libretoj, ĉiu traktos unu temon.



La verko, ne tre teoria, havos sciindaĵojn pri ĉiutaga homa medio. Leganto kun ĉ. dekjara lerneja klereco povos facile kompreni la

enhavon. Por helpi al universitataj studentoj ĝi enhavos ankaŭ partojn kun supera matematiko, disigitaj de la ĉefa teksto. La komponon helpas ankaŭ trafikaj ilustraĵoj.

La verko strebas esti pli bona ol la naci-lingvaj lernolibroj, speciale pro klareco de la prezento. Vera internacieco de la verkantaro helpas eviti la naciajn strangaĵojn.

La tasko verki la unuan originalan E-lernolibro pri fiziko estas granda, kaj la projekto apenaŭ donos profiton al la verkantoj kaj kunlaborantoj.

Kunordiganto de la projekto:

Matti Lahtinen, Ilmarisenkatu 16 c 37,  
FIN-40100 Jyväskylä, Finnlando  
el Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj, 4/94

Sinjoro Prezidanto de la Eŭropa Parlamento,

La "Movado de demokrataj financ-policistoj de Friul-Julvenetio / Italio" invitas Vin tre atente prikonsideri, en ĝia institucia sidejo, la problemon de reformado de la Financa Gardistaro.

Tiu ĉi itala financa polica korpuso, fakte, estas la nura en la mondo, kiu havas tute nekutiman militistan strukturon (ĉar ĝi, eĉ plenumante kontajn kontrolojn, apartenas al la "Armitaj Fortoj"), kaj ĝuste pro tio ĝi ne povas praktiki la rajton komunan al ĉiuj eŭropaj laboristoj, asociiĝi en sindikaton, kaj tiel ŝirmi la rajtojn kaj la laŭleĝajn interesojn de ĉiu dungito. Tio, laŭfakte, metas ĉi tiun korpuson de policaj laboristoj ekster la eŭropa realo.


Se iu interesiĝas pri la problemo, bonvolu kontakti la Movadon rekte, uzante, memkompreneble, Esperanton. (Movimento de Finanzieri Demokratici, pr. C.C.I.L. via Pondaes 8, I-34100 Trieste, Italio)

Estus bone, se esperantistoj, laborantaj por la Eŭropa Parlamento, interesiĝus pri ĉi-letero kaj subtenus ĝian disvastigon.

Triesta Esperanto-Asocio  
CP 601, I-34100 Trieste-Centro, Italio

### Fervojistaj kunvenoj: ĉu nur por turismi?

Sian ĉi-jaran kongreson la germanaj esperantistoj, laborantaj ĉe la eks-ŝtatfervojo (aŭ ĝiaj pensiuloj) aranĝis en Lübeck de la 8-a ĝis la 10-a de oktobro 1994. La asocio GEFA montris sian fortecon: 103 partoprenantoj! Sed paralele kun la strikta malgrandigo de la fervoja personaro ĝenerale, evoluas malkontentige la stato de la fervoja esperantistaro. La malhela bildo pri la estonteco atingis eĉ la publikon tra la pesimismaj eldiroj, faritaj de esperantistoj mem dum la gazetara konferenco.



La fervojistaj "fakaj" kunvenoj havas propran karakteron: ili estas turismaj aranĝaĵoj, kun bonaj manĝaĵoj, ekskursoj,


altkultura muziko kaj dancado. Centran pozicion havas la renkontiĝoj de malnovaj knatoj kaj la amikaj konversacioj. La decidorgano kunvenas aparte kaj la disponigita tempo permesas nur mallongan diskutadon de la sola fakprelego...

Ĉi-jare venis la propono plivastigi sian bazon por membrovarbado ne nur al fervojistoj sed al la tuta medioindulga trafiko. Tiel BEMI, la asocio de la biciklantaj junuloj, devus esti partnero de fervojistoj, por ili rezervo de varbado de novaj membroj, kondiĉe ke GEFA interpretas moderne sian kampon.

laŭ W. Bo.

### Akademia Konferenco en Pekino

La Kvara Internacia Akademia Konferenco de Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazis en Centra Nacia Universitato en Pekino de la 10-a ĝis la 17-a de julio 1994. Ĝin partoprenis pli ol 1.500 ĉinaj kaj eksterlandaj reprezentantoj el Japanio, Koreio, Egiptio, Aŭstralio, Usono, Germanio, Francio, Belgio, Finnlando.



Super la ĝardeno estis levitaj 6 grandaj koloraj balonoj kun sloganoj pri la Konferenco kaj Esperanto. La solenan inaŭguron ĉeestis vicprezidanto de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, aliaj oficialaj personoj. La inaŭguron prezidis vicprezidanto de Ĉina Akademio de Sciencoj Wang Fuosong, inaŭguran parolon faris vicprezidanto Hu Qiheng. Ŝi atentigis, ke Esperanto ekde sia naskiĝo portas esperon al la homaro, ĝi povas rompi lingvan baron por la monda paco, solidareco kaj kunlaboro, kaj ankaŭ servi por antaŭenpuŝi la reformadon kaj malfermon de Ĉinio kaj akceli la progreson de scienco kaj tekniko, ekonomian evoluon.

En la konferenco oni transdonis "Verdstelan Premion pri Scientechnika Progreso" al kelkaj sciencistoj el diversaj landoj.

Dum la konferenco estis faritaj pluraj prelegoj: pri Qigong, pri esplorado de homa korpo, pri novaj konceptoj de moderna fiziko, k.a. Krome estis konsultiĝoj pri la scienco de homa korpo kaj kuracado de pli ol 400 homoj per eksterordinaraj kapabloj.

Dum la konferenco estis prezentitaj diversaj ekspozicioj de E-poŝtmarkoj, ĉinstilaj pentraĵoj, kaj, krome, masaĝa kurso de Sai-onji Masayuki kaj saniga kurso de Margarete Bettmann, ĝenerala sekretario de Internacia Naturkuraca Asocio kaj germana medicinisto pri "Tempa Trako".

La reprezentantoj konstatis, ke la konferenco pasis tre sukcese kaj fruktodone.

Ji Shi (esperantigis Li Juping)

### Mao Zedong pri Esperanto

Sur la poŝtmarko aperintaj antaŭ preskaŭ unu jaro en Ĉinio okaze de 100-jara jubileo de Mao Zedong oni povas legi liajn vortojn pri Esperanto: "Mi ankoraŭ opinias, ke Esperanto estas lerninda kaj lernenda, se oni ĉin uzas por vera internaciismo kaj revolucio".

el Telopeco, okt./94

## Aranĝoj

### Somerlernejo en januaro

**Aŭkcio:** ni okazigu infankongreseton en Aŭstralio!



La Aŭkcio en la Somerlernejo (9-21 januaro 1995, Adelajdo, Aŭstralio) celos akiri monon por okazigi infankongreseton dum la UK en Adelajdo

1997. Estros la aŭkcion Donald Broadribb, kiu pasintjare sukcesis vendi dubevaloraĵojn je tre alta prezo. Venante al la Somerlernejo bv. kunporti aŭkcioĵojn ĉiaspacajn. Vin plezurigos vidi, ke vi kaj viaj valoraj aŭkcioĝos je grandaj prezoj kaj tiel helpos sukcesigi la estontan unuan Esperanto-infankongreseton en Aŭstralio. Ankaŭ kunportu vian monujon por malavare aĉeti aŭkcioĵojn.

#### Kursoj

D-ro Broadribb, membro de la Akademio de Esperanto, instruos E-lingvistikan kurson en niveloj 3 kaj 4.

Nivelo 3: "Enkonduko al la Gramatiko".


Nivelo 4: "Strukturisma vidpunkto pri la Esperanta gramatiko."

Plia informo ĉe la redakcio:

*D-r Donald Broadribb,  
59B Lukin St Beverley WA 6304, Aŭstralio  
Tel.: +61-96-461389  
el Esperanto sub la Suda Kruco, nov/dec. 94*

### Freŝa novaĵo

El Olsztyn, Polio alvenis informo pri la FREŜO-'95: Frusomera Renkontiĝo kun Ega Ŝanco por gajni orjuvelaĵojn kaj aliajn premiojn dum ĉiujara E-Renkontiĝo kun granda kvizo. (Unua premio de la kvizo pasintjare estis 200 USD, gajnita de Wacława Ledzińska).



Ĉefaj protektantoj de venontjara arango FREŜO-'95 estos la Olsztyn-a urbestro s-ro Andrzej Rynski kaj la loka ĵurnalo "Dziennik Pojezierza". Detaloj ĉe:

*s-ro Andrzej Gielert,  
skr. poczt. 861, PL-10684 Olsztyn, Polio*

### Internacia Cseh-seminario


Inter 09-13.01.1995 en Hago Internacia E-Instituto, IEI organizas Cseh-seminaron de grado "A" (por komencantaj interesigantoj), gvidatan de Katalin Smidélus el Hungario. Partoprenkotizo: 70 NLG.

Pliaj informoj, aliĝo ĉe:

*IEI, Riouwstraat 172,  
NL-2585 HW Den Haag, Nederlando  
Fakso: +31-70-3556677*

### Antwerpen '95

Turisma kaj gastronomia renkontiĝo okazos de la 12-a ĝis la 14-a de majo 1995. En la programo - ĉina kaj pola gastronomiaj manĝoj, vizitoj al la urbodomo kaj al la muzeoj: de moderna arto, de diamantoj, de navigado, "Buĉistodomo", Rubens-domo k. a., ekskurso per boato "Flandria" en la haveno.




La prezoj por unu nokto kaj matenmanĝo varias de 300 ĝis 1850 BEF, aliĝo - po 100 BEF/tage.

Plia informo, aliĝo ĉe:

*Flandra E-Ligo,  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio  
Fakso: +32-3-35433*

### 4 monatojn en Karlskoga!

La E-fako de Popola Altlernejo de Karlskoga, Svedio, okazigos 4-monatan intensan E-kurson ekde la 9-a de januaro ĝis la 19-a de majo 1995. 24 studhorojn semajne. Instroado de la komenco: nur en Esperanto.



Eksterlandanoj estas bonevenaj! La studentoj loĝos en modernaj, unulitaj ĉambroj. Oni rajtas kromelekti studfakojn kiel ceramiko, teksado, komputado ktp. La lernejo situas apud lago en alloga naturo unu km-on sude al la urbo Karlskoga.

Kostoj: 4-monata kurso 9.01.-19.05. (inkl. loĝado, manĝado): 10.800 SEK, lernolibroj +500 SEK.

*Lars Forsman,  
Box 192, S-691 24 Karlskoga, Svedio  
Fakso: +46-586-37077*

### BTER'95

Turisma oficejo "Novtur" kaj Rondo de Pola E-Asocio en Andrychów invitas vin post la 80-a UK en Tampere al Polio por partopreno en somera feriado - Beskidmontara Turisma Esperanto-Renkontiĝo (BTER'95) ekde 2-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1995.



Ĝi okazos en bela urbeto Szczyrk (centro de skisportoj) proksime al la ĉeĥa-pola limo. Loĝado en komforta hotelo. Ekskursoj en montaron, al Krakovo k.a., folkloraj koncertoj, videofilmoj estas antaŭplanataj.

Aliĝo, plia informo ĉe:

*"Novtur", ul. Włokniarzy 22, pk 30,  
PL-34-120 Andrychów, Polio.*

### UK-1995: Tampere, Finnlando

22-29 julio 1995



Kontakt-adreso por peti aliĝilon: 80-a UK, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Fakso: +31-10-4361751

## Muzika kulturo

### Rokmuziko - kaj ne nur...

EŬROKKA (Esperanto-Rok-Asocio) havas jam de 1990 sian propran disko-eldonejo *Vinilkosmo*, kaj la afero jam maturiĝis por pli ambicia projekto. Ĉi-jare ili eklaboris pri kompilaĵo de esperanta muziko, kiu aperos ne nur sur kasedo, sed ankaŭ sur kompakta disko, do kun moderna profesia sonkvalito.

Unue oni planis, ke la kompilaĵo enhavu dekkvin kantojn de dekkvin diversaj muzikgrupoj, sed oni baldaŭ konstatis, ke double tiom da muzikgrupoj povas kontribui, do post la ĉi-jara disko devas aperi dua parto de la kompilaĵo kun ankoraŭ dekkvin kantoj.

La laboro progresas tre kontentige: deko da kantoj estas jam definitive registritaj, deko da kantoj estas pretaj kaj atendas registradon, kaj deko da grupoj promesis sendi kontribuon. Inter la kontribuantoj estas kelkaj jam konataj en Esperantujo (ekz. *Persone, Amplifiki, TEAM, Kajto*), kaj kelkaj ĝis nun pli konataj en nacilingvaj medioj, kiuj nun unuafoje registras kantojn en Esperanto. Ne temas nur pri rokmuziko; tre diversaj stiloj estas reprezentitaj.



Ĉiuj kantoj de la kompilaĵo estas novaj, kaj oni eble ne faros multe da ekzempleroj krom la antaŭmenditaj, do ĉiu, kiun iomete interesas es-

peranta muziko, volos tuj mendi ĝin. Necesas iom rapidi, ĉar oni intencas baldaŭ produkti la diskon. La prezo por antaŭmendantoj (antaŭ la apero de la registraĵo) por kompaktdisko estas 98 FRF, poste 120 FRF, por kasedo 65 FRF resp. 70 FRF. Tiuj prezoj NE inkluzivas la sendokostojn.

*Vinilkosmo* estas kontaktebla ĉe:

*Vinilkosmo, Esperanto-Rok-Asocio,  
F-31450 Donneville, Francio.  
Tel.: +33-61-819565.*

## Movado

### Lego-klubo

Ĉu vi ŝatas legi? Ĉu vi ŝatas kelkfoje priparoli legitaĵojn? Ĉu vi bezonas instigilon por daŭre legi? - Eble mia propono taŭgos por vi.

Mi proponas al legemuloj regule kunveni. Por tio mi disponigas mian domon. Mi proponas du eblecojn:

- Ĉiuj kiuj anoncas sin, legas en iu monato la saman libron, kaj ni poste priparolas tiun libron kaj



elektas novan por la venonta monato.

- Ĉiu kiu volas veni, legas iun libron aŭ gazeton kaj dum la kunveno rakontas pri tiu libro aŭ gazeto. Aliaj povas starigi demandon. Tiel oni unu de la aliaj povas ekkoni multon el la E-literaturo.

Ne pensu: mi ne estas sufiĉe sperta, mi balbutos. Ne gravas la iom malfacila komenco. Gravus, ke ni ĉiam pli gustumas nian riĉan literaturon.

*Miny Massar  
el Fromaĝokloŝo, nov/94.*

*Rim.: La supra alvoko direktiĝas al lokaj esperantistoj en Nederlando, sed la ideo eble estas aplikebla internacie, eble ankaŭ en viaj rondoj. La red.*

### Rusiaj fortoj unuiĝis

Jen fin-fine okazis. La skismo en la Esperanto-movado en Rusio pasis. Ni ne plu havas nenormalan situacion, kun du tutlandaj E-asocioj kaj havas la solan, unuiĝintan. La eksteruloj ne plu povas riproĉi nin: se Esperanto estas, kiel vi asertas, "lingvo de paco", kial vi ne kapablis interparoli inter si? Evidentiĝis, ke ni ja kapablas!

Ĝu estis evitebla la antaŭa situacio? Eble, jes, sed iaspeca disfalo de la landaj E-organizaĵoj estas natura. Ja en la lando dum kelkaj antaŭaj jaroj pasis grandaj sociaj ŝanĝoj, kaj la organizaĵoj, pensaj kliŝoj pri organizmanieroj devis ŝanĝiĝi konforme al la ŝanĝoj en la makrosocio.

Nun venis la tempo por kolekti ŝtonojn. REU kaj REA, same kiel SEJM, AsAIS, diversaj entreprenaj kaj aliaj organizaĵoj akumulis riĉan sperton.

Ni provos utiligi sukcesojn de REA en la laboro kun la individuaj membroj, tiujn de REU - pri la interkluba kunlaboro, ktp.; ni povas krei novajn strukturojn, kiuj estis nekreeblaj en antaŭa situacio; eksperimenti pri novaj iniciatoj...

*Nikolao Gudskov  
prezidanto de REU*

### "E-o ne estas malpermesita en Irano"

La situacio kun E-o en landoj kiel nia iom diferencas de aliaj, ekzemple eŭropaj landoj. Pro la onidiroj, miskomprenoj kaj pro la manko de ĝustaj informoj pri E-o estas malfacilaĵoj. Kaj kiam fariĝas agoj kontraŭ E-o, observantoj, kiuj ĉiam time kaj sen klara celo sekvas la aferojn, diras: "Zorgu pri vi! Jen la dangeroj!"

Rigardante la pasintecon, ni vidas, ke neniam oficiale la ŝtato havis problemon kun E-o kaj se eventuale estis problemetoj, tiuj fontis flanke de nesciantoj kaj ne respegulis la oficialan vidpunkton de la ŝtato pri Esperanto.

La Irana Islama Respubliko neniam kontraŭagis E-on, sed eble kelkaj esperantistoj havis problemojn kun si mem. Kiam en Irano la plej altrangaj ŝtatvidantoj montras

siajn specialajn emojn pri sindefendo kontraŭ la fremda kulturo, envere E-o povas esti sindefendilo! Ĉar la plej altrangaj ŝtatvidantoj en Irano kredas, ke la naciaj kaj islaman kulturon minacas fremdaj kulturoj. Ankaŭ hodiaŭ similan opinionon ni vidas en kelkaj aliaj landoj, kiel Ĉinio kaj Hindio.

Resume ni atentigas, ke Esperanto ne estas malpermesita en Irano kaj inverse - oni entuziasme emas ĝin. La veraj esperantistoj en nia lando strebas ŝanĝi situacion kun E-o, kaj laŭ utilaj aplikadoj klarigi pri Esperanto. La epoko de E-o en Irano maturiĝis, ĉiuj iloj por ĝia disvastigado estas pretaj se ni ne havos problemon kun ni mem - jen la praktik-kampo.

*M.Reza Torabi  
el IREJO-Bulteno, nov./94*

### Internacia lingva kaj kultura ekspozicio

La internacia lingva kaj kultura ekspozicio "Espolingua Roma", okazis en Romo de la 21-a ĝis la 23-a de oktobro 1994. La ekspozicio de akademioj, universitatoj kaj kulturaj institucioj el diversaj landoj estis ĉ. 70 kaj la budoj dum la tri tagoj de la ekspozicio estis vizitataj precipe de instruistoj, faksperimentuloj kaj amaso da junuloj.

La Roma E-Centro "Luigi Minnaja" kun pluraj eksteraj kunlaborantoj sukcesis aranĝi dignan budon samnivele kun la aliaj lingvaj institucioj.



Ni disdonis flugfoliojn, broŝurojn kaj informojn pri kursoj kaj pri nia movado. Pluraj informpetantoj surpriziĝis pri la realaj aplikobloj. La afero disvolvis novajn kontaktojn, donis impulson al nia agado, kaj montris al miloj da homoj, kiuj vizitis la ekspozicion, ke Esperanto estas vivanta kaj progresanta.

*Renato Corsetti*

### Michael Jackson kaj E-klipo?

Michael Jackson, unu el la plej famaj (kaj riĉaj) rok-kantistoj aŭtune registris sian plej novan videoklipon (en Budapeŝto...), kie onidire konsiderinda parto rilatas al Esperanto.

*laŭ Forumo, n-ro 86*

### Revizio de PIV


Iom pli ol 300 personoj el dudeko da landoj partoprenis la 67-an SAT-Kongreson en julio en Ĉeĥio. Ĉi-okaze estis eldonita telefontarto kun E-teksto kaj reklamo.

La programo ĉefe konsistis el la Labor-kunsido, kiu traktis internajn aferojn de SAT (kiun partoprenas almenaŭ pasive preskaŭ ĉiu partoprenanta SAT-ano). Abundis ekskursoj kaj folkloraj prezentoj. Tute mankis politikaj prelegoj kaj debatoj en tiu (kiel oni substrekas) "neneŭtrala" kaj "peresperanta" asocio. La ununura prelego temis pri aromterapio. Aparte interesa estis la neformala kunsido pri la planata reviziado de PIV.

*el Nova Irlanda Esp-isto, okt-dec/94*

### Skulptaĵo planata

Specialan lokon en la brita movado havas *Welgwood Memorial College* en Barlastono, ĉar tie jam de pli ol 20 jaroj okazas la famaj someraj kursoj kaj multaj aliaj esperantistaj aranĝoj. La ĝardeno de la kolegio estas elstare interesa, kun multegaj diversspecaj arboj, donacitaj de pasintaj studentoj kaj aliaj, inkluzive de esperantistoj. Nun s-ro Sheppard el York planas grandan skulptaĵon de verda stelo por la ĝardeno. La komitato de Esp. Asocio de Britio jam promesis ian monsumon tiucele, sed certe multaj esperantistoj ŝatus kontribui al tiu projekto. Bonvolu sendi vian donacon al nia oficejo en Londono (140 Holland Park Ave. London, W11 4UF). Antaŭdankon!



*el La Brita Esperantisto, nov-dec./94*

**Ĉu vi jam rebonis  
por 1995?**

## Lingvo

### Ĉu cx aŭ ch aŭ c ^ aŭ ...?

Mia atento estis altirita al la bona artikolo de Roland Rotsaert pri *Elektronika komunikado en Esperantujo* en via suplemento (*Eventoj n-ro 61*); efektive la fino de tiu artikolo rekomendas, ke oni uzadu x anstataŭ h, "ĉar la oficiala ĉ = gh ne vere taŭgas por aŭtomata traktado".

Persone mi trovas tiun rekomendon danĝera. Mi klarigas:

- 1. La Fundamento rekomendas, ke "Presejoj, kiuj ne posedas literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u. Tiuj digramoj estas do Fundamentaj. Male la digramoj cx, ... estas reformaj. Tio por oficiala aspekto de la demando.
- 2. La praktiko montras, ke la Fundamentaj digramoj estas tre facile uzeblaj. La ŝanĝo aŭtomata de ĉ al ch kaj inverse estas same bone farebla ol la simila ŝanĝo de ĉ al cx. Ekzemploj kiaj *senchava* estas artefare elektitaj, sed praktike neniam renkonteblaj: en la malofteĝaj kazoj, kiam io tia okazas, oni sekvu la konsilon de Zamenhof mem kaj skribu *senchava*. Tion oni cetere devas fari, eĉ kiam ne estas supersigno! Oni tiam skribas *sen-tema* kaj povus riski, se necese, la skribon *sent-ema*! Mi koncedu, ke la sola avantaĝo de la skribo cx estas, ke en okazo de indeks-farado la literoj konservas sian alfabet-ordon! Sed nur minoritato bezonas fari indeksojn! Tio por la praktika aspekto de la demando.
- 3. Necesus legi la libron de Piron ("*Le défi des langues*"), kiu sur la p. 201 diras: "Oni ne faris la lingvon por plaĉi: ĝi plenas per k,

per j, per konsonantoj vestaĉitaj per ridindaj cirkonfleksoj. Ĝi impresas strange kaj barbare..." (elfrancigita). Tiele Piron bildigas la impreson de eksterulo (supoze el la okcidenta mondo, evidente ne el centra aŭ orienta Eŭropo!) Tio konkrete signifas, ke multaj homoj ne ŝatas Esperanton pro tiu aspekto de ĝia skribo; jam pli fruaj pioniroj prave malkonsilis doni tekston en Esperanto en propaganda artikolo: aŭdigu la lingvon, ne proponu ĝin por lego. Sed nun kun uzado de x, oni enkondukus en nian lingvon vere barbaran artefaritaĵon: kiel do oni povos legi cxevalo, sxipo, kiam oni scias, ke x praktike estas legata en ĉiuj lingvoj, posedantaj ĝin same kiel ks! Cetere la akademio tion agnoskis (Aktoj, III, p. 76). Se iu kontestos, ke, ekz-e, en la portugala, x estas legata, kiel ŝ, ĉiu mem respondos ke tio ne bonigos la legadon de chevalo. Cetere eĉ en la portugala, x estas legata kiel ks en ĉiuj sciencaj aŭ moderne teknikaj vortoj. Tio por la internacia aspekto de la demando.

- 4. Oni meditu la piednotan rimarkon de Waringhien (paĝo 96 de: "1887 kaj la sekvo...", kiu inter aliaj "akomodaj rimedoj" rekomendas la uzadon de ch kaj sh en vortoj, kiaj *Washingtono*.

Mia konkludo: tia uzado de x ne alportus veran plibonigon al la uzantoj de nia lingvo, sed ĝi alportus ion danĝeran por nia informado ĉe la publiko; multaj junuloj, precipe el Usono sed ankaŭ tra la tuta mondo, jam uzas la sistemon BBS kaj tra ili estus nerekte distilita la danĝera ideo, ke Esperanto estas malbela lingvo. Tiu ideo jam ekzistas en la publiko, sed ĝi estus komforte plifortigita.

D-ro André Albault  
prez. de la Akademio de Esperanto

## Revuoj, gazetoj

### Haiku - en Esperanto

En la poeziaĵoj "haiku", devenantaj el Japanio, la poeto ne skribas rekte pri si mem, pri siaj travivaĵoj, sed siajn sentojn esprimas per priskribo de la agordo de ĉirkaŭanta lin naturo, de la animo de la eventoj, de la vero, kaŝita en simplaj aĵoj kaj aferoj. Haikuo estas poeziaĵo konciza - nur 17 silaboj, metitaj en tri versoj po 5-7-5 silaboj.

En Polio estis fondita monatrevuo "Haiku", kiu krom la poeziaĵoj haikuo publikigas artikolojn pri la kulturo de Japanio kaj de la Malproksima Oriento. Nasĝigis la ideo eldoni ĉi tiun revuon ankaŭ en Esperanto. Depende de la interesiĝo ni pretus eldoni monatrevuon aŭ kvaronjar-revuon kaj publikigi en ĝi:

- artikolojn, tradukitajn el la pola eldono de "Haiku",



- poeziaĵojn haikuo, verkitajn en Esperanto,
- aliajn poeziaĵojn kaj mallongajn prozaĵojn ankaŭ verkitajn en Esperanto.

La verkistojn kaj ŝatantojn de la poezio haikuo, kaj ankaŭ tiujn, kiuj nur nun eksciis pri ĉi tiu poezia formo, ni petas sendi siajn versaĵojn (ne nepre en la formo de haikuo) kaj esprimi la volon aboni la planatan revuon (bonvolu ne sendi monon - por orientiĝi ni informas, ke la abonpago egalos proksimume al unu usona dolaro plus kostoj de aerpoŝto).

Karaj geamikoj, ni, poetoj, kiuj sentas pli multe kaj profunde, povas pliiintensigi la mesaĝon de nia majstro Ludoviko Zamenhof pri interkompreniĝo, frateco kaj kredo pri pli bona estonteco de la homoj en la tuta mondo. Ni fondu do la unuan internacian poezian revuon.

Robert Szybiak, poeto  
"Aria" - Haiku, skr. p. 57,  
PL-00-750 Warszawa 12, Polio

## Ĉu vi jam vidis la unuan lecionon de MAZI?

Por prezenti la serion de la nova, moderna instru-vidia projekto, la unua leciono jam cirkulas en 13 landoj, en 3 kontinentoj.

Kontaktu la sube listigitajn personojn, por interkonsenti pri prunto de la kasedo, kaj organizu ĝian prezentadon en E-aranĝoj kaj klubvesperoj.

- Argentino: Atiljo Orellana Rojas, CC 1428, RA-5000 Cordoba.

- Aŭstrio: Internacia Esperanto-Muzeo, Herbert Mayer, Batthyany stiege, Hofburg, A-1010 Wien 1.

- Britio: E-Asocio, 140 Holland Park Ave. London, W11 4UF)

- Belgio: Leo de Brujin.

- Hispanio: M. Gutiérrez Adúris, Los Coterros 1, C. 2 iz., E-39600 Muriedas, Cantabria.

- Hungario: Eventoj, Szilvási László, tel: 2828885

- Israelo: Yehuda Miklaf, P.O. Box 10536, IL-91104 Baka-Jerusalem.

- Japanio: Societo Oomoto kaj s-ro Umeda Yosimi, POB 5458 Tokyo, J-100-31.

- Kanadio: Fondaĵo Carson, 1339 Hamilton St. N. W. Calgary, Alberta, Canada T2N 3W8.

- Koreio: prof. So Gilsu, rok 158 600 Yangchon, P.O.Box 11, Seoul.

- Kroatio: Maria Belošević, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb.

- Nederlando: IEI, Dan Haag.

- Usono: prof. J. Glossop, 8894 Berkay Ave, Jennings, MO-63136, USA

- Usono: Gigi Harabagiu, 837 Geary :205, San Francisco, CA-94109, USA

Post la prezento kolektu la mendojn, kaj sendu ilin TUJ al IEI. (Pri detaloj vidu en nia antaŭa numero).

## Movada humuro

En la tramo veturis homo, kiu legis, verŝajne, iun eksterordinare interesan libron. Li jen eksaltadis pro ekscito, jen laŭte ridis, jen batis per pugno sian genuon, ekkriante: "Ha! Ne povas esti!", jen li skrapis la nukson, ripe-tante: "Ĉu? Neeble!" ktp. Mi ne plu eltenis, kaj sci-vole rigardis, kion li legas. La libro nomiĝis: "Ortografia vortaro de Esperanto"...



## Reagoj

### E-libroj kaj bibliotekoj

Jacqueline Lépeix certe konas sian propran fakon kaj bone scias, kio okazis pri la nepetitaj donacoj de libroj al publikaj bibliotekoj ("Esperantaj libroj en publikaj bibliotekoj", *Eventoj-64*). Tamen oni devas fari klaran distingon inter publikaj bibliotekoj kaj akademias kaj ŝtataj bibliotekoj. Bibliotekoj en la dua kategorio ĝenerale akceptas kaj katalogas ĉiujn ricevatajn librojn kaj neniam forĵetas aŭ forvendas ilin. Krome, ili disponigas siajn katalogojn elektronike al aliaj bibliotekoj kaj al la ĝenerala publiko, do, donacante libron al tia biblioteko oni povas almenaŭ certigi, ke ĝi aperos en "oficialaj" bibliografioj, eĉ se ĝi ne estos pruntebla. Jen du ekzemploj:

La universitata biblioteko en Kembriĝo, Britio ricevas ĉiun libron, eldonitan en Britio, kaj granda parto de ĝia kolekto estas pruntebla por diplomigintoj de la universitato kaj parto de la studentaro. Ĝi havas nur ĉirkaŭ 20 librojn en aŭ pri Esperanto, sed ĝi verŝajne ne malakceptus donacojn. Konsultu ĝian katalogon en *Internet per telnet ul.cam.uk*.

La ŝtata biblioteko en Sarlando (Germanio) estas samtempe la universitata biblioteko, sed en 1992 ĝiaj libroj estis prunteblaj eĉ al la ĝenerala publiko. Ĝi havas ĉirkaŭ 1.000 esperantajn librojn, ŝajne pro la agado de Reinhard Haupenthal. Konsultu ĝian katalogon per *telnet unisb.rz.uni-sb.de*.

Edmund Grimley Evans, Britio  
Rete: *etg10@cam.ac.uk*

\*\*\*\*\*

### Sen ĝi ne eblas gvidi...

Mi legis la artikolon pri filozofio, konceranta Esperanton, do "filozofion de Esperanto" aŭ "esperantozofion" kaj mi persone opinias, ke Esperanto kaj nia movado devas havi realan filozofion, kiu devas esti konata absolute en ĉiu E-klubo!

Mi tute ne kredas, ke filozofio de Esperanto ne estas ebla. Tio estas eĉ nepra, necesa kaj estas tre bezonata. Mi eĉ tre miras, ke ĝis nun ne ekzistas filozofio de Esperanto, ĉar ja ekzistas E-o kaj la movado! Sen filozofio ne estas ebla reale gvidi nian movadon!

Vi, kiel grava redakcio devas kompreni tion - vi devas zorgi pri tiu temo kaj organizi la aferon.

Filozofion de Esperanto kaj filozofion de nia movado bezonas ĉiu E-klubo, bezonas ni ĉiuj - geesperantistoj kaj speciale geaktivuloj de la movado. Bonvolu do turni vin al gravaj kompetentuloj pri tiuj temoj kaj akiri taŭgajn materialojn kaj prezenti tiujn en via gazeto.

Marianna Kelsz, Gdansk, Polio


*Filozofio estas mondkoncepto, sed ni ĉiuj estas diversaj. Nia movado - laŭ ni - bezonas ne mondkoncepton, sed strategion, sen kiu vere ne eblas gvidi la agadon... La red.*

## Konkurso

### Ĉion pri ĝemeloj

Por kompletigi eldonon de libro pri ĝemeloj en Esperanto, ni serĉas:

- fotojn de ĝemelaj beboj aŭ infanoj (kun nomoj kaj landoj);



- strangajn rakontojn pri ĝemeloj;  
- artikolojn pri tiu temo, kiu povas interesi legantojn;

- specialajn leĝojn pri gravedeco en via lando;

- la vorton "ĝemeloj" en via nacia lingvo.

Limdato: 31.07.1995.

La komisiono de TAKE elektos kvin gajnintojn (1-a premio: 150 NLG, 2-a: 120 NLG, 3-a: 90 NLG, 4-a: 60 NLG, 5-a: 30 NLG). Ĉiuj aliaj respondantoj ricevos ion de nia lando (pk, pm, monerojn... laŭ elekto).

Ni petas Vin sendi informon al:

TAKE-Esperanto, "ĝemeloj",  
Rue du Tiefenbach, F-68920 Wintzenheim,  
Francio

## Kulturo

### Julia Castiaux

Teatra vespero

*Kia aŭdaco! Alfronti Eŭripidon, la faman grekan tragedieverkiston! Tio estas la defio de gesinjoroj Castiaux, kiuj tradukis dek deklamojn kaj resumis la diversajn epizodojn.*

*Iom post iom ni komprenis la murdan koleron de Medea, kiu finfine mortigis siajn proprajn infanojn por venĝi la malfidellecon de sia edzo Jasono, la konkerinto de la Ora Lanfelo. La epizodojn Héléne Falk prezentis tre klare.*

*Sed la vera rivelado estis Julia Castiaux, kiu ludis la tekston kiel atenta tragedia aktorino. Tra la voĉo kaj la gestoj ŝi*

*ilustris la kreskantan frenezon de Medea.*

*Dum tiu riĉa kaj altnivela vespero ni admiris la talenton kaj la laboron de tri aktivaj kaj simpatiaj membroj.*

CDV

Pri la talento kaj kapablo de Julia Castiaux oni atestas jene:

## Esperanto en radio

### Satelite ankaŭ dimanĉe!

Ni deziras atentigi niajn aŭskultantojn, ke ekde la 1-a de majo ni aŭdigas *ĉiudimanĉe* (unuvoje en semajno!) je 12.30 laŭ la mez-eŭropa tempo - kroman E-elsendon duonhoran nur per satelito! (Eutelsat-II-F3, 16° Orient., 11.080 GHz, sonportanto 8.28 MHz).

Ĉi tiu elsendo estas eksperimento kaj ĝia estonta sorto i.a. dependos de la nombro da skribaj konfirmoj pri ties aŭskultado. Evidentiĝas, ke multaj e-istoj ne scias pri la ekzisto de niaj satelitaj elsendoj.

Verŝajne ekde la 1-a de januaro 1995 oni ĉesos uzi ĝin kaj oni utiligos novan sateliton Eutelsat en la pozicio 13° orient., kiu onidire ebligas pli bonan akceptadon. Komprenoble ni ĝustatempe informos pri tiu ŝanĝo. Ĝi estos sensignifa por tiuj personoj, kiuj disponas pri turnebla parabola anteno por ĉiuj satelitoj, la aliaj, kiuj ekz. havas aparaton por nur du satelitoj devos verŝajne alĝustigi sian poziciigon.

Pola Radio, E-Redakcio  
pk. 46, PL-00-977 Varsovio  
Fakso: +48-22-444-119  
el Parolas Varsovio, okt.194

"Mi opinias ke vi posedas veran teatran talenton. La unuanimaj aplaŭdoj post la spektado montris, ke ne nur mi tiel opinias. Mi esperas por vi kaj por la Esperanto-movado, ke vi havos aliajn multajn okazojn prezenti teatraĵojn..." (El la letero de Yves Peyraut, prezidanto de la P.K. de SAT);

"Jam kelkfoje vi prezentis viajn spektaklojn por la membroj de nia grupo: ĉiujfoje la entuziasmaj aplaŭdoj de la ĉeestantaro klare pruvis vian talenton..." (El la letero de Emile Van Damme, prezidanto de Esperantista Brusela Grupo).

Krom la tragedio de Eŭripido la programo de la aktorino enhavas humurplenan rakonton de la itala verkisto Dario Fo "La unua miraklo de la knabeto Jesuo" kaj historian dramon "La lasta punkto de la reĝino Maria Antuaneto" de la usona verkisto Jozefo Bush.

Estas notinde, ke Julia Castiaux aktoras senpage kaj postulas nur vojaĝkostojn kaj senpagan restadon, se oni invitas ŝin prezenti sian arton dum diversaj aranĝoj, kaj nenia dekoro estas bezonata.

Adreso de la aktorino por interesantoj kaj organizantoj de E-aranĝoj:

Castiau Julia, Terheidsehoek 14,  
B-3221 Nieuwrode, Belgio.

Tel.: +32-16-633613



## 25 jaroj...

En septembro '94 estis aranĝita en Budapeŝto jubilea ekspozicio (25 jaroj de LF), kio resumis la plej gravajn eventojn de nia kulturo en la lastaj 25 jaroj. Por eventuale uzi aliloke la ilustraĵojn oni devas nepre havi la skriban konsenton de LF-Koop.

## 1974

\* Forpasas en Budapeŝto Sándor Szathmári (1897-1974), kies prozo estas konsiderata kiel la plej interesa en Esperanto, almenaŭ de la vidpunkto de la enhavo. Liaj romanoj *Vojaĝo al Kazohinio* kaj *Maŝinmondo*, dekoj da rakontoj kaj la satira teatraĵo *Budapeŝta ekzameno* kontribuis al la grava kvalita progreso de nia literaturo. La kontraŭdiron inter lia pesimismo kaj lia esperantismo prilumas liaj vortoj (1961): *Baghi kredas en la eblico perfektigi la homon pere de edukado; mi - ne. Sed mi tiel dezirus, ke li pravu*



\* Prof. d-ro Ivo Lapenna (1909-1987) retiriĝas de ĉiuj oficoj en Universala Esperanto-Asocio, dum mondkongreso en Hamburgo. Ivo Lapenna gvidis UEA-n, kiel estrarano en diversaj funkcioj, laste kiel prezidanto, ekde 1933. Lia prestiĝo kreskis enorme post la rezolucio favora al nia lingvo, fare de UNESKO en Montevideo (1954). Sed lia historia graveco situas precipe en la fortigo de UEA, kiu atingis faktan monopolon en la reprezenta-



do de nia parolkomunumo sur internacia bazo. Kune kun Edmond Privat, li estas konsiderata la plej talenta oratoro en la historio de nia lingvo.

\* La nomo de Ivo Lapenna estas ankaŭ ligita al la plej grava libro eldonita en 1974: *Esperanto en Perspektivo*. Sintezo de la historio de nia lingvo kaj de ĝia komunumo, ĉi tiu enciklopedia teksto estis ĉefredaktita de Lapenna kun asisto de Ulrich Lins (movadhistorio) kaj Tazio Carlevaro (literaturo).



(daŭrigota)

EVENTOJ, Njt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X  
A kiadó és a szerkesztőség címe:  
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 282-88-85.  
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti az MPV-HPI.  
Készült a SZEKER Bt. nyomdában:  
H-1161 Budapest, Baross u. 114.  
EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.  
Eldonas LINGVO-Studio kaj Kultura Esperanto-Asocio.  
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro: László Szilvási.  
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavoj.  
Represo de artikoloj estas permesita, kun indiko de la fontoj.  
Abonkotizo: 65 nlg (aere 76 nlg) al la UEA-kodo ell-s.

## INTERNACIA KONKURSO POR MEZLERNEJANOJ.

### 4-a taskfolio por komencantoj

1. Kato saltis sur la tabl... Kio mankas ĉe la vortofino? (2 poentoj)
2. La filino estas tia, kia la ... Finu la frazon! (2 poentoj)
3. Kiu demanda vorto mankas? (2 poentoj)  
*Mi ne trovas la libron. ... ĝi povas esti?*
4. Faru almenaŭ ses vort(radik)ojn uzante la literojn de Roland! (3 poentoj)
5. El kiuj konstantaj elementoj konsistas leteroj? (3 poentoj)
6. Trovu antonimojn (evitu malvortojn!) de la verboj: *ricevi, vendi, naskiĝi!* (3 poentoj)
7. Solvu la enigmon:  $pa + 3 + n$  (2 poentoj)
8. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Andreo Cseh, nia granda metodologo. En kiuj landoj (nomu almenaŭ ses) li instruis Esperanton? (3 poentoj).

La solvojn sendu ĝis la 16-a de januaro 1995 al:  
*Gimnazio Thuri György, Esperanto-Grupo, Szent Imre u. 9. H-8100 Várpalota, Hungario*

### 4-a tasko por progresantoj kaj Eventoj-legantoj

Regularon vidu en *Eventoj*, 2/julio-94!

1. Kompletigu la frazon! (3 poentoj)  
*Mi ege ..., ĉar ... mia malĝentila konduto oni mallaŭdis min ... multaj homoj.*
2. Esprimu per unu vorto: (3 poentoj)  
*ritme movi la membrojn / loko, kie oni dormas / diri tre laŭte*
3. Ĉu kun, per aŭ 0? (3 poentoj)  
*iri ... kvarpiede / domo ... balkono / juri ... Dio*
4. Faru almenaŭ ses vort(radik)ojn uzante la literojn el Roland! (3 poentoj)
5. El kiuj konstantaj elementoj konsistas leteroj? (3 poentoj)
6. Trovu antonimojn (evitu malvortojn!) de la verboj: *ricevi, vendi, naskiĝi!* (3 poentoj)
7. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Andreo Cseh, nia granda metodologo. En kiuj landoj (nomu almenaŭ ses) li instruis Esperanton? (3 poentoj)

La solvojn sendu ĝis la 16-a de januaro 1995 al:

*Gimnazio Thuri György, Esperanto-Grupo, Szent Imre u. 9. H-8100 Várpalota, Hungario*



## Interese...

### Eĉ en la ĉielo...

Ne ĉiuj esperantistoj scias, ke ili havas siajn patronojn eĉ en la ĉielo! Krom Virgolino Maria, al kiu estis konsekrita IKUE, ekzistas ankoraŭ tri ĉielaj patronoj de esperantistoj, kiuj mem estis esperantistoj aŭ esprimis pozitivan rilaton al Esperanto. Ili estas: Sankta Pio la Deko, sankta Maksimiliano Maria Kolbe kaj beata Tito Brandsma...

laŭ Dio Benu, 2/1994

## Anoncetoj

Nekomercaj anoncetoj de abonantoj estas senpagaj

Redaktoro de la gazeto "Brazila Heroldo" estas Josenildo Marque. Adreso de la redakcio: CP 1887, BR-01059-970 Sao Paulo, SP, Brazilio.

Koszalin-a filio de Pola Esperanto-Asocio festos sian 35-jariĝon fine de decembro 1994. Vi povas agrablighi ĝin sendante bk kun kelkaj salutvortoj. Jam nun estas preparata E-ekspozicio de diversaj eldonaĵoj (libroj, gazetoj, bultenoj, afiŝoj, turismaj informiloj, pk ktp.), kiu okazos 9-15 de januaro 1995. Ni antaŭdankas pro viaj kontribuoj! *Mgr Czesław Baranowski, Pola E-Asocio, skr. poczt. 30, PL-75-016 Koszalin, Polio.*

Anatolo Gončarov havas novan adreson: *alja 5, UKR-334320 Evpatorija, Ukrainio.*

Celante diskonigi sian eldonaĵon "Almanako Lorenz" Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz (Caixa Postal 3133, BR-20001 Rio de Janeiro, Brazilio) sendos al petintoj la unuajn numerojn (1981 - 1984) kontraŭ unu respondkupono aŭ E-literaturaĵo.

Ĉiun duan dimanĉon monate okazas E-lingva diservo en "Hinde St. Methodist Church" en London W1, je 15h15. Joan Dawson, +44-81-4279596.

Juri Pistora sukcesis enigi Esperanto-Fakon en la nove establitajn urban muzeon de Ĉeska Trebová (Ĉeĥio). Por gratuli kaj impresi la urbajn instancojn, sendu salutkartojn al: *Mestské Muzeum, Esperanto-parto, CZ-56002 Ĉeska Trebova.*

## Korespondi deziras

19-jara nederlandano serĉas knabon, ĉu gejan aŭ ne por korespondi pri ĉiuj temoj. *Leon H. Roijen, Vosdaalstraat 24, NL-614111 BT Limbicht Nederlando.*

Mi estas 26-jara fraŭlino, movo-difektita. Mi dez. kor. kun ĉiuj. *Judit Hegyes, Béke u. 53, H-7400 Kaposvár, Hungario.*

Pri turismo, precipe montara, en larĝa agosfero, pri fotoĝrafio, politiko kaj teatro dez. kor. s-ano, posedanta aŭton kaj loĝejon por gastigado: *Marian Rajchel, Os. Handlowe 8/26, PL-31-936 Kraków, Polio. Tel.: +48-12-46154.*

Tre dez. kor. kun div. landoj pri junulara muziko. Kol. BK pri pejzaĝoj, fotojn pri kanzonistoj kaj kantensembloj, pri aktoroj. 16-jarulo *Maria Piskorz, ul. Chlebiczna 45, Kraków-Sidzina, PL-32-050 Skawina, Polio.*

26-jarulo dez. kor. tutmonde pri muziko, literaturo, E-agado. *Ma'gorzata Skorupska, PL-64-117 Krzycko Wielkie 21 a, Polio.*

42-jara profesoro de sociologio pri turismo kaj divers. kulturoj. *Asif Visca L-nborglien 85, N-5035 Bergen-Sandiken, Norvegio.*

13-15-j. komencantinoj, junaj pentristinoj tutmonde kun samaĝuloj: *Tatjana Omelenko, str. K. Simonova 16/5 - 4, RUS-617050 Nitva Permskaja obl., Rusio;* *Oksana Dedova, str. Urickogo 90, RUS-617050 Nitva Permskaja obl. Rusio;* *Olga Bakaldina, str. Lenina 14 - 49, RUS-617050 Nitva Permskaja obl., Rusio.*



# Eventoj

"...esperantisto sen gazeto estas kiel birdo sen flugilo..."

- aperas dusemajne, akurate, ankaŭ somere;
- interesajn, elektitajn artikolojn represas el ĉ. 100 aliaj E-revuoj;
- raportas pri aktualaj aferoj: kie, kio okazas en Esperantio?
- informas pri aranĝoj, renkontiĝoj, pri esperanto-servoj, instruado;
- aboneblas ankaŭ por kalendara duonjaro!
- helpas al la abonantoj per diversaj servoj (esperantaj literoj al komputiloj, adresaro de E-gazetaro, donackuponoj, ktp.)

**EVENTOJ APERAS DUSEMAJNE,  
KAJ ĜI ESTAS IO ALIA, OL LA KUTIMAJ MOVADAJ GAZETOJ...**

Jara abono: egalvaloro al 65 guldenoj,  
aerpoŝte: 76 guldenoj.

La abonkotizon sendu al vialanda kotizperanto (vidu la dorsflankon),  
kaj la suban abonilon al la redakcio: pk. 87, Budapeŝt, H-1675, Hungario!

sendu al: EVENTOJ, H-1675 Budapeŝt, pk. 87. Hungario

Jes, mi abonas EVENTOJ-n por la  tuta jaro 1994!  
 2-a duonjaro de 1994!

Familia nomo, nomo: .....

Preciza poŝta adreso: .....

..... poŝta kodo .....

Dato: ..... Subskribo .....

## ABONTARIFOJ

La baza jara abonkotizo por 1995 estas 65 guldenoj, kun aerpoŝta sendo: 76 guldenoj.

Duonjara abono validas por la periodo julio-decembro (!) por 50 % de la jara kotizo.

La abonkotizo estas pagebla ankaŭ al la UEA-kodo: ELLS-S aŭ rekte al la redakcio.

### LANDAJ KOTIZPERANTOJ

**Aŭstralio:** Libroŝerbo de EAE, Tom Elliott, Pk. 230, Matraville, 2036 N.S.W.

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144). • 407 ATS

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). • 1250 BEF, aere: 1465 BEF

**Brazilio:** Brazila Esperanto-Ligo, Cx. Postal 03625, Brasilia (DF) 70084. • 20 \$

**Britio:** Esperanto-Asocio de Britio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, ĝirobanka numero: 54 851 0008. • 24 £, aere: 28 £.

**Bulgario:** Ljubomir Trifonĉovskij, Al. Stambolijski 17, ap. 11, BG-3000 Vraca. • 35 gld.

**Ĉeĥio:** peranto vakas, • 770 KCS.

**Danio:** Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J. (Poŝtĝirnumero: 696 47 37) • 228 DKK, aere: 266 DKK.

**Finnlando:** Oy Mendoservo, Kivistöntie Hyvinkää, SF-05510.

• 205 FIM, aere: 240 FIM

**Francio:** UFE, 4. bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris).

• 205 FRF, aere: 235 FRF.

**Germanio:** Monda Merkato, Alfred Schubert, Pf. 1539, D-82355 Weilheim, (konto 365255-806, postĝiroamto München, BLZ 700 100 80). • 58 DEM.

**Hungario:** LINGVO-Studio, H-1675 Budapeŝt, pk. 87. • 1450 Ft, duonjare: 800 Ft.

**Hispanio:** Hispana Esperanto-Federacio, Rodriguez San Pedro 13-3º-7, E-28015 Madrid. (Bankkonto: 14.011.966 ĉe Caja Postal, nome de Federacion Española de Esperanto)

• 4875 ESP, aere: 5700 ESP

**Islando:** Libroŝerbo de IEA, Saemundsson Hallgrimur, Godatuni 10, IS-210 Gardabae.

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204).

• 60 mil ITL, aere: 70 mil ITL.

**Japanio:** Rondo Harmonia, Yamaguti Sin'iti, Tutihara 3-205, Tenpaku-ku, J-468 Nagoya-si. • aere: 4500 JPY

**Koreio:** - peranto vakas

**Kroatio:** Kroata E-ista Unuiĝo, M. Beloŝeviĉ, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb.

• 29 gld.

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, poŝtĝirokonto 0809 5100318.

**Nov-Zelando:** Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.

**Polio:** P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa. • 35 gld.

**Portugaliao:** Libroŝerbo de Portugala Esperanto-Asocio, Rua rd. Joao Couto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa. • 65 gld.

**Rumanio:** - peranto vakas, • 29 gld.

**Rusio** (kaj eksa Sovetio): Eldonejo IMPETO, Jelena Ŝevĉenko, a/ja 428, RUS-119048 Moskvo.

• 24000 rubloj

**Slovakio:** peranto vakas, • 29 gld.

**Slovenio:** INTER-KULTURO, Zlatko Tiŝljar, Koĉevarjeva 12, SLO-62000 Maribor, Slovenio. • 29 gld.

**Svedio:** Sveda Esperanto Federacio, SEF, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby.

• 285 SEK, aere: 330 SEK

**Svisio:** Christoph Scheidegger, Im Schledorn 6, CH-4224 Nenzlingen.

• 52 CHF, aere: 61 CHF

**Usono:** Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, POB 1129, El Cerrito, CA-94530.

• aere: 45 USD.

**Venezuelo:** Prof. J. E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A. • 20 \$

**Ĉiuj aliaj landoj:** UEA-kodo ELLS-S, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. • 65 / 76 gld.



Estimata Samideano,

Ĉu vi volas esti informita pri la movadaj aferoj? **EVENTOJ** aperas dusemajne, do estas **la plej ofta** internacia movada gazeto, legata nun en pli ol 50 landoj. Bonvolu aldone trovi provekzempleron.

Karaktero de Eventoj estas duobla:

- unuflanke aperigas aktualajn informojn pri la movadaj eventoj;
- aliflanke ni represas la plej interesajn artikolojn el ĉ. 100 aliaj gazetoj.

Abonantoj de Eventoj **ricevas senpage** la suplementojn, (ekz. ni ĉiujare aperigas la liston de ekzistantaj E-periodaĵoj), povas utiligi la aperantajn "donackuponojn", povas ricevi al sia komputilo Esperantajn literarojn, kaj povas senpage aperigi siajn nekomercajn anoncetojn.

**Ni invitas Vin aboni la gazeton por 1995!** La baza abonkotizo (inkluzive la 24-fojan sendokoston) estas 65 guldenoj, aerpoŝte: 76 gld, do prezo de unu numero estas inter la plej malmultekostaj! (Bv. mem kalkuli kaj kompari...) Por aboni la gazeton bv. resendi la aldonitan slipon, kaj pagi la kotizon al iu landa kotizperanto aŭ al nia UEA-konto: ELLS-S.

Volonte ni konsiderus Vin ankaŭ kiel nia kunlaboranto. Atendante vian leteron, kun samideanaj salutoj

## KIOM KOSTAS?

Nomo de la gazeto	Kiomfoje aperas jare	Simpla abonkotizo por 1994	Proporcia prezo de 1 numero	Neta (sen poŝtelspezoj) abonkotizo	Proporcia neta prezo de 1 numero
Eventoj	24	65 nlg	2,70 nlg	41 nlg	1,71 nlg
Esperanto	11	58 nlg	5,27 nlg	47 nlg	4,27 nlg
Kontakto	6	29 nlg	4,83 nlg	23 nlg	3,83 nlg
Heroldo	16	50 nlg	3,12 nlg	34 nlg	2,13 nlg
Monato	12	69 nlg	5,75 nlg	57 nlg	4,75 nlg
Sennaciulo	11	44,5 nlg	4,05 nlg	33,5 nlg	3,05 nlg
TEJO Tutm.	4	15 nlg	3,75 nlg	11 nlg	2,75 nlg
.....	...	.....	..... nlg	..... nlg	..... nlg

Por taksu la abonprezon eble estas interese studi la supran tabelon. Kiel abonkotizo (por kompareblo) estis konsiderata la nederlanda kotizo. Ju pli ofte aperas iu gazeto, des pli kostas la poŝta frankado, do estas kalkulita ankaŭ la neta (=sensendokosta) kotizo. Kiel sendokosto, estas subtrahita po 1 NLG por sendo de 1 numero, kio pli-malpli validas en ĉiuj koncernaj landoj.

Kompreneble la supraj ciferoj rilatas nur al la abonkotizo, sed neniel koncernas la enhavajn valorojn!

*Gilvái K*  
László Szilvási